



NI SAVU NIAJN SEMOJN (NSNS)

Savotaĵoj

1. Libroj
2. Revuoj, organoj, gazetoj, periodaĵoj
3. Varbiloj, informiloj, faldfolioj
4. Esploroj kaj formaj, diplomlaboraĵoj kaj similaj
5. Mapoj
6. Muzikaj komponaĵoj kun eo teksto, kantoj kaj similaj
7. Diskoj, sondokumentoj, vidbendoj
8. Iloj, steloj, insignoj, flagoj

Ĉiu stablo, asocio, eldonejo aŭ privatulo, kiu eldonas ion ajn, sentu sin devigata sendi po unu ekzempleron al la sube menciitaj konservejoj. Tiu arda peto de ILEI kaj UEA (por ne diri « postulo ») validas ekde eldonkvanto 20.

Ricevantoj, deponejoj

Biblioteko Hodler Roterdamo NL

CDELI La Chaux-de-Fonds CH

Esperantomuzeo Vieno AT

ILEI arkivejo Herzberg DE

Biblioteko Aalen DE

Ĉina universitato (Vidu aldonon sube)

Iu establo en Nord-Ameriko esplora aspekto

Iu establo en Sud-Ameriko esplora aspekto

En kazo de granda financa malhelpo la eldonanto povas redukti sian kontribuon sendante sian eldonaĵon nur al la 3 unuaj bibliotekoj.

Anoncantoj

Tiu agado estas lanĉita de ILEI ; UEA apogas ĝin.

Okaze de tiu kampanjo rekomendo iru al la eldonistoj kaj eldonantoj: nepre sendu unu ekzempleron al via nacia biblioteko.

Ceteraj konsideroj

Oni povus konsideri dividon de la aĵoj : ke libroj iru al iu konservejo, ke sondokumentoj iru al alia konservejo, ke la revuoj iru al alia konservejo, kaj tiel plu...

Pri tiuj konservejoj oni devas konsideri la liberan surfacon cele al kresko, la leĝan stabilecon kaj la bezonatajn lokajn homfortojn.

La listo de deponejoj montras jam ekzistantajn famajn establojn. Pro tiu kampanjo povas esti okazo ekrilati kun publika biblioteko aŭ universitato por komenci novan kunlaboron.

Starigo de reta katalogo endas, sendepende de aĉeto.

Endas starigo de reta biblioteko, kiu entenus la kompletajn dokumentojn en elektronika formo en protektita maniero por plej efika kaj kompleta konservado.

Endas starigo de reta biblioteko, kie oni povas elŝuti verkojn por elektronike legi ilin aŭ senpage aŭ post pago.

Montevideo, Urugvajo, la 19an de Julio 2014

Laŭ ideo de Mireille Grosjean

Prilaborita de 12persona laborgrupo okaze de la 47a Konferenco de ILEI

Protokolo farita de Mireille Grosjean, prezidanto

El diskuto en Buenos Aires AR kun « Trezoro » Sinjoro HUANG Yinbao

2014-07-27

En la universitato de Zaozhuang en provinco Shandong estas muzeo pri Eo kun granda surfaco kaj enorma aro da esperanto-objektoj. Estus tre taŭga loko. Devus esti kontrakto dulingva, cn kaj eo, kun la universitato aŭ la urbo aŭ la ĉina Ŝtato, ILEI kaj UEA.

Mi venas al la ideo, ke mi devus lanĉi saman kontrakton inter la urbo La Chaux-de-Fonds kaj ILEI kaj UEA pri CDELI.

Mi scias pri la ekzisto de Fondumo en la urbo Herzberg pri la ligo inter la urbo kaj Eo. Mi akiris la statuton de ĝi.

Ni devus verki ian modelan kontrakton, kiu povus esti bazo por aliaj tiaj ligoj.

Ĉu ekzistas ia esploro pri la grandeco de niaj bibliotekoj, surfaco, liniaj metroj uzeblaj, nombro da unuoj, kreskeblo ? Tia katalogo devus ekzisti.

Mireille Grosjean